

Kluba Bulteno

Organo de Klubo Esperantista en Oslo

N-ro 3 2011

Vendredon la 2an de septembro

59a jaro

Kalendaro

Ni komencas je la 19a horo.

Kie? / Hvor? – vd. sekvapage, malsupre / *se nederst på neste side.*

Lundon la 5an de septembro (semajno / uke 36) – *mandag*

La Universala Kongreso en Kopenhago. Partoprenintoj raportos. Ni diskutos kaj prijuĝos.

Verdenskongressen i København. Del-takere forteller. Vi diskuterer og vurderer.

Lundon la 19an de septembro (semajno / uke 38) – *mandag*

La postkongresa ekskurso al Oslo. Ni resumos kaj prijuĝos.

Etterkongress-arrangementet i Oslo og omegn. Vi oppsummerer og vurderer.

SE TAMEN la organizinto, Cato Haugen, ne povos veni, ni anstataŭe diskutu pri la teroratencoj en julio: Kion ni povas fari por eviti la aperon de pliaj ABBoj?

DERSOM arrangøren, Cato Haugen, likevel ikke kan komme, tar vi isteden en diskusjon om terrorhandlingene i juli. Hva kan gjøres for å forhindre at nye ABber dukker opp?

Lundon la 3an de oktobro (semajno / uke 40) – *mandag*

Ses junaj norvegoj trovis en suomiaj arbaroj eksbieneton kun saŭno, salto-tabulo kaj sovaĝaj homlupoj. Venu por aŭdi kio okazis tie, kaj kiom postvivis.

Seks norske ungdommer dro inn i de finske skogene og fant et nedlagt småbruk med sauna, trampoline og ville varulver. Kom og hør hva som hendte der, og hvor mange som overlevde.

Lundon la 17an de oktobro (semajno / uke 42) – *mandag*

Bjørn Øyen somerumis en Danlando. Li rakontos pri siaj vizitoj al Christiania, la Martinus-centro kaj alio.

Bjørn Øyen tilbrakte noen sommer-uker i Danmark. Han forteller om sine besøk på Christiania, Martinus-centeret m.m.

Daŭrigo sur la sekva paĝo

Forts. neste side

Kalendaro (daŭrigo / *forts.*)

Lundon la 7an de novembro (semajno / uke 45) – mandag

Krizoj en la monda ekonomio. Ni unue kolektos ekonomifakajn terminojn kaj poste Bjarte Kaldhol*, kiu delonge atente sekvas la evoluon, klarigos pri la lastatempaj okazoj. Kiel nun investi la kluban kapitalon?

*ne konfirmite

Kriser i verdensøkonomien. Først samler vi litt økonomisk fagterminologi. Deretter forklarer Bjarte Kaldhol, som nøyte har fulgt utviklingen i mange år, om den siste tidens utvikling. Hvordan nå investere klubbens kapital?*

*ikke bekreftet

Lundon la 21an de novembro (semajno / uke 47) – mandag

Skeptiko. Kristoffer Haug prezentos tiun organizon, kies internacian kunvenon en Usono li partoprenis ĉi-somere. Ĝi estu kritika korektilo de fantaziaj kaj nesufiĉe bazitaj asertoj en la norvegaj amasmedioj.

Skepsis. Kristoffer Haug forteller om denne organisasjonen, et kritisk korrektiv til fantastiske og dårlig begrunnede påstander i norsk offentlighet. Han deltok i sommer i dens internasjonale konferanse i USA.

Lundon la 5an de decembro (semajno / uke 49) – mandag

La misiado de diversaj religiaj sektoj kaj la propagando de la politikaj partioj – ĉu iel aplikeblaj al la E-movado?

Misjonspraksisen i forskjellige religiøse sekter og de politiske partienes agitasjon – kan disse på noen måte overføres til esperantobevegelsen?

Lundon la 19an de decembro (semajno / uke 51) – mandag

Literatura kunveno. Ĉiu prezentu iun libron.

Litteraturmøte. Alle presenterer en bok.

Lundon la 2an de januaro (semajno / uke 1) – mandag

Kiajn esperojn kaj kiajn planojn ni havas por Esperanto en la nova jaro?

Hvilke håp og hvilke planer har vi for esperanto i det nye året?

Kunvenejo ("Esperantonia") Olaf Schous vei 18 (enirejo en Schouterrassen) en Sinsen. Buso 31 aŭ tramo 17 al Rosenhoff kaj de tie iru supren laŭ Båhusveien; aŭ iru malsupren de Sinsen T (buso, metroo) aŭ de la haltejo Sinsenterrassen (tramo) laŭ la samnoma strato.

OkazIS

Lundon la 4an de aprilo.

Otto Prytz rakontis el siaj spertoj pri vojaĝado kiel blindulo kun kaj sen akompananto. Ambaŭ havas siajn avantaĝojn. Poste ni diskutis kiel la teknologia evoluo unuflanke adaptas la socion al vidantoj per uzado de ŝildoj kaj ekranoj, sed aliflanke produktas helpilojn, ekz-e parolantajn informtabulojn, por blinduloj.

Lundon la 2an de majo

Anstataŭ la anoncita diskuto ni havis viziton de nia membro Nicolas Raymond (Kongsberg), kiu ĵus revenis de franca E-kongreso en Sète en suda Francio. Li havis multon por rakonti – kaj eĉ filmeton montris – precipe el siaj renkontoj kun partoprenantoj el Kongo, Nepalo kaj Japanio.

Lundon la 16an de majo

Eble ĉar ni malmultis, la diskuto finiĝis per la konkludo ke la butikoj estu fermitaj dimanĉe, ĉar la homoj, inkl. la butikajn dungitojn, bezonas ripozan tagon.

Lundon la 6an de junio

Ni informiĝis pri planoj de NEL pri nova retejo kaj diskutis pri pluraj praktikaj aferoj baldaŭ okazontaj loke.

Lundon la 20an de junio

Ni ekskursis al Huseby malnova bieno, piediris al la apudaj historiaĵoj kaj vespermanĝis en muzea etoso en la ĉefdomo.

Lundon la 8an de aŭgusto

Kromkunveno kun gasto, Nijl Blonstein el Novjorko, kie li estas volontula reprezentanto de UEA ĉe UN. Nijl montris bildojn pri siaj renkontiĝoj kun famuloj de la politika mondo kaj la E-movado kaj rakontis precipe pri interreteja Esperanta agado en Usono.

Lundon la 15an de aŭgusto

Kromkunveno kun gasto, Dominique Simeone, partopreninto de la ĵusa internacia fondkongreso de la liberpensuloj kaj de la trijara kongreso de la Internacia Humanisma kaj Etika Uniĝo. Cetere li estas responsulo de la Liberpensula Frakcio de SAT.

DD

Someraj gastoj

Krom la gastoj kun kiuj ni aranĝis kromkunvenojn (vd. supre) kaj la postkongresanoj, vizitis nin somere ankaŭ Vladislav Hasala (filatelisto el Ĉeĥio), Pier Luigi Cinquantini (la redaktoro de la itala *L-Esperanto*), Krystyna Poreda (Pollando), Gerardo Tobias (Pollando), Joŝiteru Takahaŝi (Japanio), Vincent Riendeau (Kanado), Maria Medvedeva el Saratov, Ruslando kaj Amelie Matt, survoje de Helsinko hejmen al Tromsø.

T-ĉemizoj , glumarkoj, insignoj

Ni vendas diversajn T-ĉemizojn:

Verdaj, kun blanka teksto *Vi snakker esperanto. Gjør du?* .

Blankaj, kun verda/bruna teksto *Esperanto er kult.*

Blankaj, kun verda/bruna teksto *Esperanto la internacia lingvo*

Po 100 kronoj, ĉiuj. T-ĉemizo kun E-teksto vekas intereson pri Esperanto.

Ankaŭ glumarkoj "Mi amas Esperanton" . Folio kun 22 por 4 kr.

glumarkoj "Ne krokodilu. Mi parolas Esperanton." po 1 kr.

Kaj jak-insignoj. 3,5 cm, kun "Esperanto" en la jubilea simbolo. Po 3 kr.

Aŭtuna renkontiĝo en Värmland

Nia plej proksima konstanta E-kursejo, en trankvila vilaĝo Lesjöfors, inter arbaroj kaj lagoj 100 km nordoriente de Karlstad. 28 – 30 oktobro (semajno 43).

Lige kun la jarkunveno de la kursejo/gastejo aranĝiĝos seminarieto med diskuto pri proponata reorganizo de la sveda E-instituto kaj prelegoj de Harald Schicke (Germanio) kaj Stella Lindblom (Svedio) pri alternativa medicino. Krome vespera koncerto kun du gitaristoj.

Ĉu iu volas lui kunvenĉambron? – *leie møterom?*

Kjenner du noen som kunne være interessert i å leie møterommet vårt for én eller flere kvelder? Vi trenger leieinntekter! Brosjyre med nærmere opplysninger og bilder kan du få fra kontoret.

Fondaĵo Kjell kaj Aase Gustavsen

Ni memorigas pri la kluba fondaĵo Gustavsen. Ĝi estis starigita en 2004 per donaco de Kjell (1915–99) kaj Aase Gustavsen por subvencii junularan aktivadon – precipe vojaĝojn por serĉi inspiron ĉe la movado en eksterlando, sed ankaŭ alian agadon el kiu povas profiti la Oslo-kluba junularo. Petskribojn akceptas la kluba estraro (per la oficejo adreso <oficejo[a]esperanto.no>).

Klubo Esperantista en Oslo, Olaf Schous vei 18, 0572 Oslo. Tlf. 22 35 08 94
www.esperanto.no/oslo Retpoŝto: <oficejo[a]esperanto.no>
Poŝtĝiro 0532 36 19699 (sed kotizon pagu al NEL/Forbundet 0533 05 22870).